# LA FERVOJISTO

**Oficiala organo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj.**
**Monata fakrevuo pri fervojo.**

**Redaktoro: ILIJA PUHALO, fervojoficisto, Jezuitska ulica 1. Zagreb, Jugoslavio.**

**Jaro II. Oktobro 1924. Nro. 1.**

STEVAN V. STOJNIĆ, kontroloro de S.H.S. ŝtataj fervojoj.

### Antaŭen ĝis la venko!

Kiu antaŭen? . . .

Ĉu la plej nove elektika estraro de I. A. E. F.?

Ne! Ĝi alvokon nenian bezonas! Ĝi jam iras la vojon celitan!

Sed tutmonda gefervojistaro vekiĝu el malsana kaj profunda dormo »kaj rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante« sekvu la novan estraron ĝis certa venko de nia sankta ideo, ĝis certa efektiviĝo de nia dolĉa songo!

Oni vidas, ke la feraj ligiloj ne estis sufiĉe fortaj kaj taŭgaj por kunigi la gefervojistaron en unu grandan rondon samfakanan.

Kvankan la relo-la sole estanta interligilo de ĉiulandaj gefervojistoj estas senanima kaj sensenta materio, tamen ni — fervojistoj — ne devas tio esti. Sed se nia Asocio ankaŭ pluen tiel progresos, kiel ĝi progresis ĝis nun, tiam ni montros al la tuta mondo, ke ni havas nek animon, nek senton eĉ ne kapon.

Ĉar anstataŭ miloj da membroj, ni vidas nur tricenton!

Anstataŭ havi multpaĝan fakan revuon nenion ni havas!

Anstataŭ labori, ni dormegas!

La nova estraro petas seriozajn gefakanojn pripensi tion, por ke ili ekvidu ke tio estas bedaŭrinda vero.

Tiam ni rigardu ĉirkaŭen, kaj ekvidu ĉu la estraro sola povas aliigi tiun malĝojan staton de nia Asocio.

Ne! Tio ne estas eble!

Nenia estraro povos tion fari sen serioza helpo de tutmonda gefervojistaro.

Unue ni devas anstataŭ ĝisnuna interligilo krei la novan, kiu estos taŭga forte kunligi nin, vivantajn kaj laborantajn sur feraj vojoj de la tuta mondo.

Tiu nova interligilo povas esti nur la faka revuo, eldonata ĉiumonate.

La nuna estraro opinias, ke nia asocio ne estos taŭga vivi, se ĝi ne havos tiun interligilon.

Tial ĝi decidis regule eldonadi nian »La Fervojisto« kies unuan numeron ni, jen, prezentas al vi, gekolegoj.

Sed por regula eldonado, kaj konstanta plibonigado de nia fakrevuo estas absolute necesa sincera helpado de ĉiuj niaj gemembroj.

Tiu helpado devas esti duspeca: materiala kaj morala. La materiala helpo estas sankta devo de ĉiu membro. Ĉiu membro pagu sian kotizon. Ĝi estas nun tiel malalta (45. Dinarojn aŭ egalvaloro — por unu jaro) ke ĉiu fervojisto povos ĝin pagi. Kaj due, ke ĉiu membro varbu ĉiujare almenaŭ unu novan membron.

La morala helpo konsistas el skribado de fakartikoloj, sciigoj, raportoj ktp. por nia fakrevuo.

Kiel oni vidas, ĉio, kion oni postulas de membroj kaj de tutmondaj gefervojistoj estas vere tiel malmulte, ke ĉiu povos tion oferi por nia ideo kaj por la progreso de nia asocio.

Do, oni vidas ke la sukceso de nia Asocio dependas ne nur de laborado de ĝia estraro, sed pli multe de subtenado de niaj membroj speciale, kaj ĝenerale de tutmondaj gefervojistoj.

Pro tio ni invitas ĉiujn niajn samideanojn kaj gefakanojn, ke ili aliĝu al sia faka asocio, kaj komencu labori por ĝia intereso.

Tiel agante estas pli ol certe, ke nia asocio laŭ la vortoj de nia majstro.

Ni paŝo post paŝo, post longa laboro.
Atingos la celon en gloro.«

### EFEKTIVIĜAS!

Efektiviĝas la songo de niaj malnovaj anoj!

Jen, la unua numero de nia faka gazeto, jen, la tiel longe atendita »La Fervojisto«. Sed oni eble diros moke, »jes jen, la unua, sed Ĉiopovanta sciu, kiam aperos la sekvantaj numeroj«.

Ho, ne! Tiuj, kiuj tiel diras, eraras. Eble neniam ĝis nun la I. A. E. F. troviĝis en pli bonaj cirkonstancoj tiurilataj.

Kial? oni demandos. Jen, kial. Ĉefa kaŭzo pro kiu ne estis eble eldonadi propran fakrevuon estis manko da monmiredoj pro tro altaj eldonadkostoj, pro tro malmulte da anoj.

Nun ĉesis tiuj malhelpoj, ĉar por regula eldonado de kvarpaĝa revuo monata ni bezonas ducent anojn, por okpaĝa ni bezonas tricent anojn, kaj por dekdu paĝa sole kvarcent anojn.

Ĉu estas maleble atingi tiun nombron da anoj? Tute ne! Ĝis nun IAEF havis pli ol tricent membrojn. La nova estraro posedas la adresojn de pli ol centkvindek gefervojistoj kiuj ne estas niaj anoj.

Ĉu tiuj, serioze pripensinte la supran raporton povos rifuzi tiel brilan, favoran okazon. Mi tuj respondos.

Se ili estas konsciaj esperantistoj tiam ili ne faros tion. Laŭ mia opinio, neniam plu kaj nenie plu oni povus tiel malmultekoste eldonadi la gazeton.

Eble iu diros: Ho, jes! La tuta artikolo estas rakonto por infanoj. Ne, kara kolego, tio ne estas rakonto al infanoj tio estas ĝojiga fakto. Nova estraro bone tion sciis, kiam ĝi akceptis la proponon de eksestraro fariĝi gvidanto de IAEF. Ĝi ne dubis pri subteno de ĉiulandaj gefervojistoj se ĝi proponos tiel favorajn kondiĉojn.

Ĉu ĝi seniluziiĝos? Estus bedaŭrinde kaj oni nur montrus, ke ni ĉiulandaj fervojistoj esperantistoj estas kondamnitaj perei, ke nia asocio pri kiu kelkaj niaj anoj havas tiel belan opinion, devas malaperi el la mondo.

Ĉu ni tion permesu? Ĉu ni havu tiel malmulte da sento, tiel malmulte da espero por la finvenko de nia kara ideo? Ne!

Ni devas batali. Ni devas oferi sumeton da mono, etan parton de nia libera tempo por la sankta afero, por nia bela ideo! Tion ni faru kaj ni vidos la sukcesojn.

Ni ne fanfaronu pri nia forto, ni ne revu, ni laboru, ni batalu por atingi la longe jam sopiritan celon.

Gekolegoj! Montru al la tuta mondo, ke ni fervojistoj estas forto, ke ni estas la perantoj de la tutmonda trafiko, ke ni povas pligrandigi la IAEF, ke ni povas disvastigi Esperanton ĉien.

Ni faru tion kaj ni estos pli proksime al la celo.

Kaj tiam, kiam fine efektiviĝos la antaŭdiro de nia Majstro:

»La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos,

ni ĉiuj fiere povos diri, jes, ankaŭ mi estis la batalanto, ankaŭ mi faris mian devon.

Antaŭen gekolegoj!!! Ni montru kiom ni valoras, ni montru, ke nia ideo kaj nia lingvo ne estas utopio. **Ilija Puhalo.**

## KIO ESTAS T. E. L. F.

Okaze de XVIa U. K. en Vieno estis ĝenerala jarkunveno de I. A. E. F. ĉe kiu okazis malpaciĝo inter la anaro.

Certe ĉiu nia ano scivole demandos, kia estis tiu malpaciĝo.

Jen mi ĝin objektive priskribos.

Kiam estis publikigita la propono de eksestraro de I. A. E. F. pri la elekto de jugoslava kandidatlisto kune kun alvoko, ke ĉiuj, kiuj malaprobas la proponitan kandidatliston skribu al la estraro, alvenis sole du malaproboj. Kontraŭe aprobis la liston, la anoj el Ĉehoslovakujo, Finnlando, Francujo, Svedujo, Italio ktp. (Vidu la dankesprimojn).

Unu malaprobo estis sendita de sro. Habellock, kiu estis kontraŭ la kandidatlisto pro tio, ĉar la jugoslavoj ne fondis nacian fervojistan asocion kiel germanoj kaj aŭstrianoj (Dank al agado de sroj. Habellock kaj Steiner, kiuj tiamaniere »subtenis« I. A. E. F.).

La jugoslavoj estis konsciaj I. A. E. F. anoj, kaj vidante, ke nur forta internacia organizo povas prosperi, ne volis malhelpi ties agadon per la fondo de naciaj asocioj, sed subteni la internacian.

Dua malaprobo estis de sro. eksekretario Barvir, kiu malpaciĝis pro diversaj malgravaĵoj kun eksvicprezidanto sro. Blažek kaj pro tio tute ne volis sron. Blažek subteni en asociaj laboroj.

La malaprobo estis sendita nur pro supre menciita malpaciĝo, kaj kiel motivo estis indikite, ke la proponita listo estas unuflanka.

Sro. Habellock alsendis la malaprobon kaj sian proponon malĝustatempe, eĉ ne kun precize indikitaj nomoj de nova estraro kiun li proponis.

Krom tio la propono postulis ŝanĝon de la asociaj statutoj. Sro. Habellock tamen ne sendis detale prilaboritajn statutojn sed nur ĝenerale skizitajn.

La malaprobo de sro. Habellock estis sendita la 25an de Junio 1924, kvankam en la letero estas indikite, ke la afero pri la ŝanĝoj de labormetodo ĉe I. A. E. F. kaj ankaŭ aliaj aferoj estis pridiskutitaj jam 18an de Majo ĉe la ĝenerala jarkunveno de germanoj fervojistoj esperantistaj. Do 5 semajnojn silentis sro. Habellock kaj nur tiam li protestis kiam la kandidatlisto estis publikigita. Kiel oni nun komprenu lian agadon?

Malaprobo de sro. pseudosekretario Barvir estis sendita la 15an de Junio.

Neniu de supre citataj sroj. interesiĝis dum tuta jaro pri la asocio. Lastmomente ĉiu de ili riproĉis, sed fari ĝustatempe taŭgajn proponojn, precize klarigitajn neniu de ili sciis.

La plej interese estas, ke nuna prezidanto de T. E. L. F. sro. Hugo Steiner, eksasesoro entute ne sendis proteston.

Kiel kompreni lian agadon?

Ĉar sro. Habellock estis malhelpita persone ĉeesti li sendis anstataŭanton sron. Maks Blankenheim anon de la germana nacia asocio fervojista, kiu eĉ ne estis nia ano.

Sroj. Steiner, Blankenheim kaj Barvir postulis ĉe la jarkunveno, ke oni iliajn proponojn ĉiuokaze pritraktu antaŭ la tagordo aŭ almenaŭ antaŭ la 2a punkto de tagordo (Elekto de la nova estraro).

Post longa diskutado kaj eĉ disputado ĉeestantaj anoj malakceptis ilian postulon, dezirante, ke oni antaŭe pridiskutu la tagordon kaj poste pritraktu iliajn proponojn.

La nomitaj 3 sroj ekkolerigitaj kaj ofenditaj pro tio minacinte eliris el la kunvenejo.

Venontan tagon ili kunvokis siajn adeptojn, kiuj ne estis anoj de IAEF sed anoj de Aŭstria nacia fervojista asocio, kaj fondis »Tutmondan Esperantistan Fervojistan Ligon« kies prezidanto fariĝis vantema sro. Steiner (bedaŭrinde).

En la gazeteto »Aŭstria Esperantisto« kies eldonanto estas sro. Steiner, aperas ankaŭ la sciigoj de TELF sur sole 2 paĝoj. Se oni konsideras ĝian formaton (ĝi estas duone tiel granda kiel nia »La Fervojisto«) oni povas kompreni kiel granda ĝi estas.

Laŭ la sciigo en ĝi troviĝanta, TELF havas nun jam 180 pagitajn membrojn. Spite de tio la gazeto de TELF estas tiel granda kiel nia unu paĝo.

Nia gazeto aperados regule malgraŭ tio, ke ĝi havas laŭ la diro de sro. Steiner nur 20 anoj.

La mono por 5 numeroj 4 paĝaj troviĝas jam en la kaso. Ni ne dubas, ke ni ankaŭ ricevos la monon por pluaj numeroj.

Ĉar en la gazeto Aŭstria Esperantisto troviĝas ankaŭ la sciigo pri jarkunveno de nia asocio, kiun subskribis sro. Steiner kaj kie li malvere prezentas al legantoj la okazintan disputon, mi devas respondi al li por korekti lin.

La unua malvero estas, ke nove elektita prezidanto de I. A. E. F. venis lin peti reveni al la asocio.

Nove elektita prezidanto tute ne ĉeestis la Vienan U. K., sed nur la subskribita vicprezidanto.

Intenco de la vicprezidanto estis, atingi la konkordon kun sroj. Blankenheim, Barvir, kaj li.

Sro. Steiner kaj Blankenheim rifuzis tion.

Eĉ sro. Blankenheim esprimis sin, »ke li ne ŝatas kompromisojn kaj ke ili laboros solaj«.

La subskribinto konvinkiĝinte, ke ili estas tre obstinaj dankis al ili kaj foriris plene konvinkita, pri ilia malsukceso.

La dua malvero estas, ke nia asocio havis nur 34 pagintajn anojn, kaj ke ĝi nuntempe estas eble 20 membra.

Ni povas tion pruvi al sro. Steiner se li tion deziras.

Eble sro. Steiner opinias ke ĉiuj anoj pagas tiel regule la kotizon kiel li. Aŭ eble, ke ĉiuj asesoroj de nia asocio kolektas la kotizojn kaj ne sendas ilin al la kasisto kiel li tion faris. Se li tion opinias li tre eraras.

Niaj anoj ne pensu, ke la supre dirita kulpigo estas malvero. Ni posedas skriban dokumenton pri tio. Laŭ la deziro de sro. Steiner ni ĝin laŭvorte publikigos eĉ aperigos ĝian kliŝon.

Do, karaj gekolegoj ĉiulandaj, vi mem juĝu laŭ la supraj faktoj, kiu estas kulpa pro tiu disigo, kiu estas kulpa pro ĝis nuna malprospero de nia asocio.

Ĉu eble la eksestraro, kiun ĉiupaŝe sroj. Habelock, Steiner kaj Barvir malhelpadis? Pripensu kaj juĝu mem!

Faru konkludon kaj agu laŭ ĝi.

Subtenu tiujn kiuj volas honeste labori kaj kiuj deziras senpartie gvidi la asocion.

Ni salutas niajn gekolegojn, germanojn kaj aŭstrianojn, kaj invitas ilin aliĝi al ni, ĉar neniel ni estas iliaj kontraŭuloj. Ni nur ne povas permesi, ke iu agu tiel kiel sro. Steiner.

Tiuj, kiuj volas nin subteni kaj kies celoj estas la samaj kiel la niaj aliĝu al ni. **Ilija Puhalo.**

## NOVA ESTRARO.

Okaze de ĝen. jarkunveno de IAEF en Vieno dum XVI. UK estis elektita nova estraro konsistanta el:

P r e z i d a n t o: Stevan S t o j n i ć, kontrol o r o de ĝenerala fervoja direkcio en B e o g r a d, kolonija Min. Saobraćaja n-ro 17, Jugoslavio.

V i c p r e z i d a n t o k a j r e d a k t o r o: Ilija P u h a l o, fervoja oficisto, Z a g r e b, Jezuitska ul. 1, Jugoslavio.

S e k r e t a r i o: Pavao B u l k o v i ć, fervoja oficisto, Z a g r e b, Jezuitska ul. 1, Jugoslavio.

K a s i s t o: Emil S l a v i č e k, fervoja oficisto, Z a g r e b, želj. spremište materijala, Jugoslavio.

R e v i z o r o j: 1. Katica Š č u k a, fervoja oficistino, želj. stanica K o p r i v n i c a, Jugoslavio. 2. Stjepan S o b o t a, fervoja oficisto, želj. stanica K o p r i v n i c a, Jugoslavio.

A s e s o r o: Stjepan M u ž i n i ć, fervoja oficisto, Z a g r e b, Kukovićeva ul. 31, Jugoslavio.

La detala protokolo de jarkunveno estos publikigita en sekvantaj nroj.

## DANKESPRIMOJ.

La nova estraro sincere dankas al la eksestraro precipe al eksvicprezid. Josef Blažek, ekskasisto Emanuel Kubasek kaj asesoro por Ĉeĥoslovakujo Karel Urbanec por ilia laciga kaj en ege malfavoraj cirkonstancoj bona gvidado. Ni esperas, ke ili ankaŭ plue restos fidelaj kunlaborantoj de nia asocio.

Krom tio la estraro kore dankas al sroj. L. Lespicier, G. Bontemps (Francujo), H. Salokannel (Finnlando), K. Oppolcer, O. Crech (Ĉeĥoslovakujo), O. Dahrne, E. Erikson, (Svedujo), Dro V. Bruck, Aleviano Bisetti (Italio) fino L. Martin (Francio) kiuj aŭ skribe aprobis la proponon de nia kandidatlisto, aŭ promesis al ni subtenon.

Ni certigas ilin, ke niaflanke ni ĉion eblan faros por progresigi la asocion. Ni atendas la plenumon de iliaj promesoj.

Apartan dankon ni ŝuldas al sro. Dro. Julije Domac, prezid. de Zagreba Esperanta Societo, kiu per sia influo ĉe la presisto sukcesis por ni atingi tiel malmultekostan eldonadon de nia faka revuo.

## ENKETARO.

Por ke nia revuo fariĝu necesa amiko de ĉiu serioza fervojisto la estraro proponas kaj malfermas tiun ĉi konstantan rubrikon por diskutado pri diversaj gravaj demandoj de la fervojista servo.

La demandoj por la »Enketaro« devas esti skribitaj mallonge, klare kaj tre legeble unuflanke sur $^1/_4$ aŭ $^1/_8$ de folio.

Nia redaktejo numeros la ricevitajn demandojn kiuj laŭ vice estos presitaj. Oni presos maksimume po 5 demandojn en unu numero de la revuo.

Niaj asesoroj, delegitoj, membroj kaj ĝenerale ĉiuj gefervojistoj estas petataj studi la demandojn, eventuale pritrakti ilin en naciaj fakaj gazetoj kun rimarko, ke ili aperis en »La Fervojisto« — kaj la respondojn sendi al nia redaktejo.

La respondoj kiel ankaŭ ĉiuj artikoloj por »La Fervojisto« devas esti skribitaj nur unuflanke kaj tre legeble prefere per skribmaŝino. La respondoj estos presitaj vice laŭ alveno al la redaktejo, se estos necese komplete aŭ resume.

Pritraktinte la respondojn sammanire kiel ankaŭ la demandojn, ni internacie solvados, klarigados multajn gravajn fakajn demandojn, kiujn tiam ĉiu fervoja administracio povos akcepti.

Nia asocio nur tiamaniere ludos la rolon, kiun ĝi devus ludi kiel faka asocio.

## DEMANDOJ.

1. Kiel oni donas la horsignalon? Kiu metodo estas la plej bona?

## RESPONDOJ.

Al nro. 1. (St. V. Stojnić, kontroloro de SHS ŝtat. ferv. prezid. de IAEF.)

Ĉe la Beograda Direkcio de SHS ŝtataj fervojoj (estintaj serbaj ŝtataj fervojoj) la horsignalon oni donas tiel:

Direkcia telegrafoficejo, same ankaŭ ĉiu transiga telegrafoficejo ekkomencas precize je la 11 a horo kaj 55 minutoj doni sur fiksitaj telegraflinioj la signon de cirkulero . . .

Je momento kiam la direkcia horloĝo ekmontras la 12 an horon direkcia telegrafisto ekkomencas telegrafi: »12 horoj«. La telegrafistoj de transigaj telegrafejoj rimarkante la komencon de la signalo nome la ciferon 1 komencas sammomente doni la saman signalon.

Telegrafa regularo (administra) ordonas al la stacioj la devigan ĉeeston ĉe telegrafaj aparatoj kaj ateston de la ricevita horsignalo.

RIMARKO: Tiu ĉi demando estas tre grava speciale por niaj fervojoj, ĉar tie ĉi oni verkas nuntempe la novan telegrafregularon.

Ĉar ankaŭ mi partoprenas en tiurilata komisio, por kiel eble plej rapide ricevi tiurilatajn respondojn mi petas ĉiujn gefakanojn kiuj volas respondi, sendu siajn respondojn direkte laŭ mia adreso. Ekkoninte la respondojn mi sendos ilin al nia redakcio.

### FAKA TERMINARO.

Dezirante plenumi ankaŭ tiun ĉi programpunkton de niaj statutoj la estraro sendis al sro. Edward M. Rosher, inĝ. el San Francisco, USA (125a Beulah St.) leteron petante lin, kiel oficialan estron de fervoja terminarkomisio elektita de L. K., kunlabori en nia faka gazeto.

Sro. Rosher estis tiel afabla kaj sendis al ni du paĝan manuskripton de faka terminaro, promesante ankaŭ pluen kunlabori.

Lian leteron kaj terminojn ni publikigos en sekvanta n-ro de nia organo.

Ni opinias, ke estus plej oportune se ĉiuj anoj dezirantaj kunlabori, sendus al nomita sro. fakajn terminojn. Li esplorus la ricevitajn terminojn, komparus ilin kun aliaj, ricevitaj de aliaj kunlaborantoj kaj elektinte plej taŭgajn sendus ilin al nia redakcio.

La vortaro devas ĉiuokaze esti verkata laŭ Kabe-a metodo.

Tiel agante ni atingos tre rapide taŭgan vortaron.

Detala propono pri tiu ĉi grava afero estos publikigita en sekvanta nro.

Ni kore dankas al sro. Rosher por lia afabla subteno petante lin, ke li daŭrigu kunlaboradon.

Spertaj gesamideanoj! Sekvu lian imitindan ekzemplon.

### INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO EN ANGLUJO.

Laŭ la ricevitaj sciigoj oni intencas 27-an de Augusto 1925 aranĝi en Anglujo Internacian Fervojistan Kongreson.

Kongreson oni aranĝas pro 100 jara datreveno de finkonstruo de unua fervojlinio konstruita de Georg Stephenson.

Por ke ni povu precize informi niajn anojn pri tiu kongreso, la estraro sendis al sro. Jones H. Arthur, Svansea, Britlando, leteron en kiu ĝi petis lin por informoj.

Kiam la respondo alvenos, ni publikigos ĝin.

La estraro de IAEF intencas viziti tiun kongreson.

### SCIIGOJ DE LA ESTRARO.

Ni atentigas ĉiujn anojn, kiuj ankoraŭ ne pagis kotizon, ke ili tion tuj faru, ĉar ni sendos nur la unuan kaj duan numerojn al ĉiuj anoj sen-escepte. La tria kaj sekvantaj n-roj estos senditaj nur al tiuj kiuj la kotizon pagos.

Malnovaj anoj ricevos glumarkon por tiu ĉi jaro kiel ateston, ke la kotizo estas pagita.

La glumarko estos aldonita al tiu numero de revuo, kiu aperos post la alsendita kotizo.

Ni petas la anojn atenti-je tio.

En la tria kaj sekvantaj numeroj aperos la adresaro de ĉiuj anoj pagintaj la kotizon.

Tiuj, kiuj ne pagos kotizon, estos konforme al la statutoj eksigitaj kaj la eksigo publikigita.

### EKSIGO.

Okaze de ĝen. jarkunveno estis eksigita el IAEF sro. Hugo Steiner, fervojinspektoro kaj eksasesoro, pro tio, ĉar li agis kontraŭ la interesoj de la asocio, fondante propran nacian ferv. organizon, anstataŭ subteni la IAEF.

### NOVAJ ANOJ.

304. Palsberg Martin, fervojasistanto, Aarhus, Langenlandsgade 4/1, Danujo.

305. Ločnikar Ivan, fervojficisto, Maribor, kurilnica, Jugoslavio.

306. Jarc Ivan, fervojgardisto, Rogoza. P. Hoče pri Mariboru, Jugoslavio.

307. Schwarcz Ede, staciestro, Čokaželj. stanica, Banat, Jugoslavio.

308. Pung Augustin, afergvidanto de estonia fervoja Administracio, Maŝinfako. Tallinn, Telliskivi 34, Estonio.

309. Medinius J. E., fervojoficisto, Mosas, Svedujo.

310. Višnjić Milan, fervojoficisto, Zagreb, Mihanovičeva 12, Jugoslavio.

### KOTIZOJ.

Ĉiu ano paginta la kotizon ricevas la oficialan organon.

Kotizoj estas jene fiksitaj: Aŭstrio: 30.000 K; Anglujo 6 Ŝil.; Belgio 15 Fr.; Bulgario 80 Lev.; Ĉeĥoslovakujo: 15 čk.; Danujo 7 Kr.; Estonio 200 MK; Finnlando 30; Francio 15 Fr.; Germanujo 2.50 OM; Hispanujo 8 P.; Hungarujo 4 OK; Italio 15 L.; Japanujo 3 J.; Jugoslavio 45 D.; Latvio 3 L.; Nederlando 3 G.; Norvegujo 7 Kr.; Polujo 3 Zl.; Rumanijo 125 L.; Svedio 3 K.; Usono 1 D.; Svisujo 3 Sv. fr.

Landoj kiuj ne estas indikitaj pagu la egalvaloron de 1 Dollaro.

### KIEL SENDI MONON AL NI.

Eksterlandanoj kaj enlandanoj sendu la monon en rekomendita letero al: Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (kasisto Emil Slaviček) Zagreb, Jugoslavio, Jezuitska ul. 1.

RESPONDA REDAKTORO: ILIJA PUHALO. PRESEJO: C. ALBRECHT, ZAGREB.